MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO

2

FEBRUARO 2019 Kol. 406/35

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: La renkontiĝo en Königswinter, Leonardo da Vinci, Opero en Esperanto, Handikapitoj en trajnoj, Invitoj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

La 4-a Luminesk´ en Königswinter

La jarfina aranĝo okazis en Germanio la 27.12.2018 – 3.1.2019 en la JUFA-hotelo proksime al la urbo *Bonn*. Partoprenis ĝin 65 geesperantistoj el dek landoj, inter ili ankaŭ estrarano kaj la ĝenerala direktoro de UEA. Sabate vespere okazis interkonatiĝo en amika etoso kun gustumado de du lokaj vinoj - blanka kaj ruĝa. Dum la semajno ni aŭskultis diversajn interesajn prelegojn.

De Yoshie kaj Dieter Kleemann ni eksciis pri la insulo *Shikoku* kaj pri tradicioj rilate al la 9-a simfonio de Beethoven. De Christiane Oeter ni lernis kiel vivi sen kuirilo kaj ni povis gustumi kelkajn ŝiajn vegetarajn ellaboraĵojn.

Rakoen Maertens prelegis pri sia agado ĉe UNESKO kaj UN parolante pri falsaj novaĵoj, misinformo, propagando kaj pri aliaj interesaĵoj. Li ankaŭ prezentis al ni la Unesko-kurieron. Yves Nevelsteen parolis pri novaj vortoj en Esperanto, pri Esperantaj markonomoj en Benelukso kaj pri bitlibroj kaj bitrevuoj. Dima Ŝevĉenko prezentis sociajn retejojn kaj Esperanton. Kun Anna Striganova li parolis pri la revuo Esperanto, kiun ili redaktas kaj pri ilia eldonejo "Impeto". Sur tabloj estis instalitaj varoj de la libroservoj de FEL kaj de Impeto. Dieter Rooke parolis pri la historio de la Esperanto-literaturo kaj gvidis la internacian ĥoron. Kristin Tytgat gvidis paroligan kurson. Okazis kvizo por la plej saĝa homo. Venis ankaŭ ĵurnalistoj por intervjuo.

La temoj de Wera Blanke estis: "Publike paroli - kiel efike interkomunikiĝi" kaj "Kiel traduki *Maulstasche* - terminologiaj konsideroj pri regiona specialaĵo". Anna Striganova prelegis pri: "Dronintaj urboj - fabelaj kaj realaj" kaj pri: "Kial nun modas antagonisto?" Vladimir Rodin konigis al ni la historion de la plej longa transsiberia fervojo. Barbara Branderburg parolis pri la nova biblioteko de GEA. Ŝi ankaŭ organizis "La Majstrokuiristo ĉe Luminesk'". Tri kandidatoj prezentis sin post la konkurso. Rudolf Fischer okupiĝis pri ŝercoj. Amri Wandel parolis pri turismado en Israelo kaj Jordanio, invitis la ĉeestantojn al la venontjara Israela kongreso, prezentis la nombron de Esperanto-parolantoj en la mondo kaj parolis pri akvo-ekologio de la Ruĝa al la Morta maro. Bernard-Régis Larue interese rakontis pri la unuaj

temploj kaj pri la pordo de la Edena ĝardeno. Ulrich Brandenburg prezentis bildojn pri Finnlando por instigi la partoprenantojn al la venonta UK en Lahti. Ni havis la plezuron gustumi kelkajn manĝaĵetojn preparitajn de lia edzino kaj tipan brandon. Iuj prelegoj estis enkadre de la Internacia Vintra Universitato (IVU) kaj ĉe la fino, AIS-atestiloj estis transdonitaj al la sukcesintoj de la ekzameno.

La Silvestra vespero komenciĝis per festa manĝo kaj la balo estis inaŭgurita per polonezo. La dancado estis interrompita noktomeze por bonvenigi la Novan Jaron. La 1-an de januaro grupo da partoprenantoj promenis en la naturo.

Dum la renkontiĝo okazis du tuttagaj ekskursoj: la unua gvidis nin al la monto *Petersberg*, kie ni povis trarigardi la faman hotelon, kie en la pasinteco loĝis multaj gastoj de la registaro, kaj kie estis subskribitaj gravaj kontraktoj. En la apuda urbo *Röhndorf* ni havis eblon enrigardi la iaman domon de la germana kanceliero Adenauer. La ekskurso finiĝis en la vinmuzeo de la urbeto *Mayschoss*, kie ni trarigardis la vinkelon kaj poste gustumis kvar diversajn vinojn de la regiono.

La dua tuttaga ekskurso ebligis al ni ekkoni kelkajn lokojn en la universitata urbo *Bonn*. Unue ni vizitis la muzeon pri historio de okcidenta kaj orienta Germanioj, iliaj evoluoj de post la milita epoko ĝis hodiaŭ. Bona tagmanĝo atendis nin en historia restoracio apud la tre bela malnova urbodomo. Posttagmeze ni vizitis la iaman naskiĝdomon de la mondkonata komponisto

Ludwig van Beethoven. Restis iom da tempo por promeni tra la placo. Ĉiuvespere, post la oficiala programo, en "gufujo" okazis varia aldona programero, kiun lerte prizorgis gesinjoroj Kleemann. Por la adiaŭa vespero ili preparis krimludon. Ni ĝuis ankaŭ rakonton el Aŭstralio, poemojn kaj fabelojn, ŝercojn kaj peĉakuĉon (prezentado de 20 bildoj prikomentataj nur po 20 sekundoj). Unu vespero estis dediĉita al la forpasinta Hans-Dieter Platz (alinome HDP). Omaĝe al li estis montritaj diversaj bildoj el pluraj Internaciaj festivaloj, kiujn li sukcese aranĝadis dum tri jardekoj en diversaj lokoj de Germanio.
Ni partoprenis Luminesk' la unuan fojon. Al la agrabla aranĝo ni invitas vin partopreni jarfine. Organizas ĝin Germana Esperanto-Asocio (GEA). Dankon pro la amiketosa semajno kaj bona organizado. *Liba Gabalda*

Nunjare ni rememoras la 500-jaran jubileon de forpaso de la plej granda itala pentristo, skulptisto, inventisto, arkitekto, anatomiisto, botanikisto, muzikisto kaj verkisto

Leonardo da Vinci

naskiĝinta la 15-an de aprilo 1452 en Anchiano ĉe Vinci en Italio. Li mortis la 2-an de majo 1519 en Amboise en Francio. Leonardo da Vinci estis inĝeniero kaj sciencisto de la alta renesanco, facile vivanta en du kulturoj de scienco kaj belarto. Li naskiĝis kiel ekster-geedzeca filo de la notario Piero da Vinci kaj de la vilaĝanino Katerina, kaj edukiĝis en la ateliero de la fama florenca pentristo Verrocchio. Grandan

parton de sia frua laboro li plenumis kiel helpanto de Ludovico il Moro en Milano. Poste li laboris en Romo, Bologna kaj Venecio kaj pasigis la lastajn jarojn de sia vivo en Francio, en la bieno, donacita al li de la reĝo Francisko la 1-a.

Oni ofte priskribis lin kiel arketipon de la renesanco, homon, kies kvazaŭ senlima scivolemo estis komplementita per lia kapablo inventi. Li estas vaste konsiderata kiel la plej granda pentristo de ĉiuj tempoj kaj eble la plej multfacete talenta persono, kiu iam vivis.

Lia ĉefa akceptata merito kaj ĉefa okupo estis pentrado. Du el liaj verkoj *Mona Lisa (La Gioconda)* kaj *La Sankta Manĝo (La Lasta Vespermanĝo)* okupas la unikajn lokojn de la plej konataj, plej ofte reproduktataj kaj parodiataj portretoj kaj religiaj verkoj de ĉiuj tempoj, kies famo estis nur iugrade atingata per la Kreo de Adamo fare de Michelangelo. Inter la pentraĵoj de Leonardo ankaŭ la *Vitruvia homo* estas ikona. Entute nur ĉirkaŭ 15 liaj pentristaj verkoj sukcesis supervivi ĝis nia tempo, tio estas ege malgranda nombro pro lia konstanta, ofte katastrofa, eksperimentado kun novaj teknikoj kaj lia kronika prokrastado. Tamen, tiuj malmultaj verkoj kune kun liaj notlibroj, kiuj entenas desegnaĵojn, sciencajn diagramojn kaj liajn pensojn pri la naturo de pentrado, konsistigas grandan

kontribuon por postaj generacioj de pentristoj, kontestataj nur de lia rivalo Michelangelo.

Kiel inĝeniero, Leonardo grandskale antaŭis sian tempon per siaj ideoj. Li konceptis helikopterojn, tankon, sunan baterion, kalkulilon, proponis la teorion de plata tektoniko. Nur malgranda kvanto de liaj planoj estis realigitaj dum lia tempo, por multaj entute ne eblis konstrui ilin tiuepoke, sed kelkaj malpli grandaj inventoj, kiel aŭtomate turniĝanta ŝpinilo kaj la maŝino por testi la distiran forton de dratoj, eniris tutmondan industrion sen mencio de lia nomo. Kiel sciencisto li draste antaŭis la sciostaton de sia tempo en la terenoj de anatomio, civila inĝenierado, optiko kaj hidraŭliko. El E-Vikipedio

Esperanta opero de Ivan Acher en la Nacia teatro de Prago

Tiu ĉi foto montras la grupon da esperantistoj, kiuj estis kunvokitaj post la prezentado de la opero Sternenhoch al la antaŭsalono de la Nova scenejo de la Nacia teatro en Prago. Kvankam la opero havis jam la duan postpremieron (premiero estis en aprilo), partoprenis ĝin esperantistoj ne nur el la Ĉeĥa respubliko, sed ankaŭ de eksterlando. Ni renkontis geamikojn el Francio, Bulgario, Brazilo, Pollando, Italio kaj Slovakio. Sekvis nin en granda entuziasmo la ceteraj vizitantoj de la teatro. Certe ili per la

propraj okuloj vidis, ke Esperanto senĉese vivas kaj konstante havas multajn favorantojn.
La opero Sternenhoch kantata en Esperanto, tradukita de Miroslav Malovec, certe ne estas vidaĵo por ĉiuj, sed eĉ ne Ladislav Klíma estas plaĉa por ĉiuj. Tiuj, kiuj ne konas la aŭtoron, nek la romanon, eble ili provos kompreni tion laŭ la enscenigo. La opero rakontas – simple dirite pri la rilato inter la princo Sternnenhoch kaj lia edzino Helga kaj pri tio, kiel tiu ĉi rilato influis ankaŭ al agado koncerne ilian infanon.
En ĉiu okazo havas la opero de Nacia teatro meriton por la estiĝo de rimarkinda moderna opero. Jarmila Rýznarová

Ĉeĥio: Servoj por handikapitoj en trajnoj

Problemoj kun transporto de homoj kun malaltigita movkapablo kaj orientiĝo apartenas por nacia fervoja trafikisto al tiuj prioritataj. Al vojaĝantaj personoj kun malaltigita movebleco tial Ĉeĥaj Fervojoj ofertas multajn priservojn, kiel ekzemple *veb* ČD modifita por personoj kun perturboj de la vidkapablo, prizorgon de helpanto por entrajnigo, preferan rezervadon de sidlokoj en trajnoj, multfunkciajn pasaĝervagonojn kun platformo por ĉaretoj, basplankajn elektrajn kaj motorajn veturilojn aŭ veturilkompleksojn kun instiggvidaj avertiloj en centoj da veturiloj, senbarierajn necesejojn aŭ unikan rezervadsistemon destinitan al ĉaretoj rekte sur *retpaĝo* ČD. Pli ol 75% el ĉirkaŭ

7200 ĉiutage trafikantaj trajnoj de Ĉeĥaj Fervojoj sukcesas nun komforte transporti handikapitajn personojn. La nacia trafikisto kun evoluo de ĉi tiuj servoj preparas ankaŭ enkadre de ofertoj en publikaj konkursoj por prizorgi trafikon en regionoj en la jaro 2019. Laŭ la Bulteno ČD Jindřich Tomíšek

I N V I T O J

1) al printempaj E-kursoj kaj ekzamenoj en la belega franca Esperanto-kastelo Greziljono (Gresillon), ili okazos de 26.4. ĝis 4.5.2019. Ĝojas je vi gvidanto bert.schumann@gmail.com

2) La 86-a Itala kongreso de Esperanto en Trieste okazos de 24. – 31. de aŭgusto 2019. La retadreso: kongreso@esperanto.it

3) La 49-a Lingva seminario kaj amika renkontiĝo en la pensi-ono Espero en Skokovy okazos de 3.4. ĝis 7.4. 2019 La retadreso: drahotovaesperanto@seznam.cz , tel. 720 652 320.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.